



**International communication without discrimination  
Internacia komunikado sen diskriminacio**

## **“En Edinburgo okazis KUNkongreso ... nomo neordinare trafa”**

En Edinburgo ĵus (t.e. de la 20a ĝis la 22a de aprilo) okazis kongreso ‘KUN’ ... nomo neordinare (kaj ŝajne neintence?) trafa. Legante fruajn anoncojn pri ĉi-jara Esperanto-kongreso en Britio, mi tuj rimarkis ion nekutiman: oni ĝin nomis ‘Kunkongreso’. Nu, kial tiu prefiksa ‘kun’?

Ĉu temas pri kongreso ideala – kun multego bona, sen ajna grava manko? Tion neniel pretendis ĝia organiza komitato, kiu tuj klarigis, ke temas pri du kongresoj samtempe kaj samloke okazontaj: la 107a Skota kun la (nur!) 93a Brita. Tamen, altaj espero de kongresanoj, kiuj

samkiel la verkinto unuavide misinterpretis tiun enigmecon titolon, verdire apenaŭ estis trompitaj. Jen kial!

Kongreso en preĝejo? Tion laŭŝajne oni estis aranĝinta, kaj la alta turo, kun pinta supro kaj granda horloĝo, de St Andrew’s and St George’s West, emis

*Daŭrigo sur la sekva paĝo*



*Panoramo de la partoprenantaro*

• **EAB wins Cigno Prize for ‘outstanding publicity in EU country’**

page 13

• **New venue for summer courses**

page 9

• **UEA nun ‘konsulta partnero’ kun Unesko**

page 12

• **John Francis – translator of Milton 1924–2012**

page 10

Fotis Terry Page



konfirmi tian supozon. Sed necesis nur malfermi ĝian pordon por konvinkiĝi, ke la kongresejo estis saĝe elektita, ĉiel celtaŭga. Akcepteja giĉeto okupis

Supre: *Sakŝalma majoro muĝe malfermis la kongreson.* Sube: *Kongresanoj vigle babiladas ĉetabele en la manĝejo dum unu el la kafopaŭzoj.*



nur malgrandan angulon de la t.n. Olive Tree Cafe – salono L-forma, kun multaj tabloj, seĝoj kaj eĉ foteloj, kie frue alvenintaj kongresanoj jam sidadis kaj babilis, kaj kie poste ili plurfoje bufede manĝos, kaf- aŭ te-trinkos, kaj ripozos antaŭ kaj inter programoj. Dum daŭro de la Kongreso tiu salono ricevis alian nomon, tiun de *John Francis*, lastatempe mortinta poeto de la 'Skota Skolo', kaj verkinto de granda poem-ciklo *La Kosmo*. Novajn nomojn ricevis ankaŭ du ceteraj kongres-  
*Daŭrigo kontraŭe*

## Informado de EAB premiita

Ĉar mi ne apartenas al la informa skipo de EAB, kiun majstre dirigentas Brian Barker, mi eble rajtas elkore gratuli ĉiujn, kiuj kontribuis al la informado dum la pasinta jaro, kiu – inter alie – gajnis al EAB la Premion Cigno el Japanio (nia prezidanto John Wells skribas pri tio sur paĝo 13).

Eble vi jam vidis, ke la unuan fojon aperas 'QR'-kvadrato sur la kovrilo de ĉi tiu gazeto. Kio estas la Esperanta termino por tiu nova alirejo al elektronikaj informoj? Eble iu kun laŭmoda poŝtelefono pretus raporti, ke ĝi funkcias en la presita grandeco.

Kaj refoje ni dankegu la organizintojn de la brita kaj skota kongresoj en Edinburgo pro ilia sindona laborado por la bono de la tuta brita movado. Kiel iu taŭge komentis: "Kiam tiuj, kiuj havas kaj la talenton kaj la deziron laboregi kviete en la fono tiel faras, ni ĉiuj gajnas."

Geoffrey Sutton

- Material for the next issue of *EAB Update* should be with the editor no later than 26 August.
- Materialo por la venonta numero de *EAB-Gisdate* atingu la redaktoron plej laste la 26an de aŭgusto.

*EAB-Update / Ĝisdate* is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**

- **Tel.** 0845 230 1887 / +44 (0)1782 372141
- **Fax / fakse:** on request / laŭpete
- **E-mail / rete:** eab@esperanto-gb.org
- **Websites / ttt-paĝaroj:** www.esperanto-gb.org  
www.esperantoeducation.com

□ **Membership** of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter or youth member £10 / Membrigi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto aŭ juna membro pagas £10 pundojn.

☆

□ **Material for EAB Update** should be sent by e-mail, computer disk (rtf format, please) or hard copy direct to the editor / **Materialon por EAB-Ĝisdate** oni sendu rete (datenanarĝon rtf, mi petas), diske aŭ papere rekte al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich Norwich NR11 6JW; e-mail/retpoŝte: gsutton@computekmail.co.uk. Material

may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / retpoŝte: uea@uea.org; www.uea.org)**, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesco.

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimataj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

ĉambroj, ambaŭ en supra etaĝo: *David Kelso* (kie okazis solenaĵoj, Jarkunveno de EAB, kaj ĉefaj prelegoj) kaj *Jack Casey* (studrondo, Jarkunveno de EAS, Libro servo). Sanktejojn, aliloke en la granda konstruaĵo, kongresanoj ne bezonis.

### Identigilo helpa ankaŭ por orientiĝo

Kongresinsigno, kiun ricevis ĉiu alveninto, ŝajnis strukture tute kutima, kvankam ja aparte bela. Ĝi tamen enhavis surprizon: dorsflanke troviĝis instrukcio 'malfaldu la paperon', kaj tion farinte oni malkovris utilan mapon de la urbocentro, kun ĉiuj gravaj renkontejoj klare indikitaj. Bonega ideo, kiun imitu organizantoj de estontaj kongresoj!

### Inaŭguro neforgesebla

Fruulojn oni gvidis promen-ekskurse tra la urbocentro, sed por la plimulto komenciĝis la Kunkongreso per bufeda manĝo kaj – sakŝalm-koncerteto! (Nu, en Skotlando tio eble ne meritas krisignon, tamen ... .) Majstre! Nia ŝalmisto estis tradicie (kaj multkoste) vestita, kaj baldaŭ montris sin lertega ludanto de sia komplika kaj laŭtvoĉa instrumento. Krome, kaj egale grave, li estis humurema kaj simpatia komunikanto, kiu regalas la



*István Ertl, tradukisto ĉe EU kaj ĉefa gastparolanto ĉe la kongreso, regalas nin per entute tri altnivelaj kaj pensigaj prelegoj.*

publikon per respondoj kaj komentoj ne nur informaj sed ankaŭ ridige spritaj. Starto ĝojiga, kiu ekzemplis la etoson de sekvontaj tagoj. Bonvenigaj vortoj de la Prezidanto de EAB kaj de membroj de la LKK estis ja varmaj kaj sinceraj, parolado de Seán O'Riain, Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, ja plena je interesaj informoj (interalie pri ĉi-jara EEU-Kongreso en Irlando), sed vera stelulo de tiu Inaŭguro estis – la sakŝalmisto!

**Prelegoj pensigaj – kaj spritaj** Gastpreleganto István Ertl elektis tri kontrastajn temojn: *Beletra tradukado al kaj el Esperanto; Esperanto kaj Eŭropa Unio – ĉu miraĝo, ĉu perspektivo?*; kaj

*Finvenkismo, raŭmismo, lingvaj rajtoj: kien ni iras?*

Ĉiu lia prezento estis plena je informoj, ideoj kaj laŭokazaj ŝercoj – eble eĉ tro plena, ĉar iu(j) petis, ke li bonvolu paroli malpli rapide. (Tion, li ja provis fari, malgraŭ tio, ke la rapidecon je unu kazo motivigis dekminuta prokrasto de preleg-komenco, pro neceso komuniki al la publiko gravajn informojn pri estontaj programeroj.)

Ceteraj prelegoj estis simile altnivelaj kaj interesplenaj: *Plibonigo na Esperanto* (Marteno Miniĥ), *Red Star Line: Vojo al Feliĉo?* (Jakvo Schram), kaj *Roksano* (Paul Gubbins). Okazis ankaŭ porpublika prelego en la angla lingvo, *Why do people invent languages?*, kiun prezentis John Wells. Tion ĝuis ankaŭ iuj kongresanoj, kiuj supozeble taksis tro malfacila samtempan prelegon pri nekutima (kaj pli mojosa?) lingvouzo.

### Jarkunvenoj pozitivaj

Ĉar la kongreso estis kuna, okazis en Edinburgo ne nur unu sed du Jarkunvenoj – de EAB kaj de EAS. Pri ambaŭ oni detale raportos aliloke, do mi diros nur, ke dum la Brita regis ĉi-jare bonhumoro kaj pozitiveco,

*En la ĉefsalono, kongresanoj atente aŭskultas la preleganton.*



Fotis Terry Page

samkiel en ĉiuj ceteraj kongresaj programeroj. La Skotan mi, estante anglo, ne partoprenis, sed tre surprizus min se ĝia etoso estus iel alia.

### Parlament-vizito privilegie ĉiĉeronita de stabano

Sabaton posttagmeze kongresanoj vizitis la skotan parlamentojn. Oni dividis nin en kvar grupojn, el kiuj du eniris la konstruaĵojn tuj postalvene, dum aliaj du aŭ esploris apudan Holyrood House, aŭ promenis sur proksima ulekse-ora deklivo, de kie oni ĝuis belegan perspektivon trans la urbego. Mi estis durilate bonŝanca: komencis pluvi nur post reveno stratnivelen de surmonta promenado; kaj mi ricevis lokon en grupo



gvidata de Alasdair MacCaluim, stabano en la parlamentejo, kaj flua parolanto de la angla, la skot-gaela kaj – Esperanto! Dank'

*Surpodie dum la Malfermo sidas, de maldekstre, Hju Rid, John Wells, Seán ÓRiain kaj Ed Robertson.*



*La vico por voĉdoni ĉe la Jarkunveno – rezultis solida subteno por la estraro*

al lia lerta ĉiĉeronado mi nun iom konas ne nur la modernan kaj arĥitekture interesan ejon, kie kunvenas skotaj parlamentanoj, sed ankaŭ kiel oni tie organizas sian laboron.

### Disaj agrablajoj neatenditaj

Ne ĉio, kio okazas dum kongreso anonciĝas en la tiel-nomata Kongreslibro. Plaĉis al mi partopreni en la sekvaj aranĝoj.

### Vesperfina koncerteto

Post la sabatvespera prelego de Jakvo Schram, oni devus, laŭ la programfolio, aŭdi la voĉon kaj gitaron de Rob Hawkins. Tiel ja okazis, ja plaĉe. Sed agrabla surprizo estis kroma koncerteto de pianmuziko – betovena kaj mozarta – fare de fingre lertega Francesco Maurelli.

### Sonorigado

Ĉeestis tri kongresanoj, kiuj kutime sonorigas dimanĉ-matene preĝejajn sonorilojn. Tion ili povis fari ankaŭ en Edinburgo, pro afabla invito de teamo lokana.

### Ekumena Diservo kaj vizito al murpentraĵoj

Programo de kongreso, kio devas esti neŭtrala rilate tiajn aferojn,

The membership's votes were as follows:

	<i>For</i>	<i>Against</i>	<i>Abstentions</i>
Ian Fantom	2	53	14
Clare Hunter	69	0	0
Edmund Grimley Evans	62	2	5
Tim Owen	69	0	0
Hugh Reid	63	1	5
Ed Robertson	64	0	5
Michael Seaton	59	2	8
John Wells	66	0	3
<i>For president:</i>			
Ian Fantom	2		
John Wells	66		

• The following were elected to the Management Committee: Clare Hunter, Edmund Grimley Evans, Tim Owen, Hugh Reid, Ed Robertson, Michael Seaton and John Wells (president).

ne inkluzivu oficialan diservon. Tamen en la kadro de kongreso rajtas okazi tiaj neneŭtralaj fak-kunvenoj, kaj pluraj kristanoj (kaj eble ankaŭ ne-kristanoj) kunvenis tiucele en apuda Katedralo de Sankta Maria. Bonvenigis partoprenantojn la sorĉa voĉo de solviolono, kiun oni aŭdis denove dum medit-paŭzo, kaj ankaŭ elirante. En proksima ĥor-ekzercejo troviĝas grandaj murpentraĵoj, pentritaj de Phoebe Traquair. Tie preĝintoj pasigis horon agrablan kaj interesan, dum kiu oni aŭskultis historion de la artaĵoj, kaj ek-konis iujn pentritajn figurojn.

**Kvizo ja 'komedia':** La Edinburga kunkongreso finiĝis ne per tradicia Solena Fermo, sed (por tiuj ĉeestantoj – proksimume la duono – kiuj ne elektis bankedi) per tute senceremonia 'Komedia Kvizo'. Entuziasmige ĝin gvidis – kaj foje bridis – Rolf Fantom, disjetante ne-tro-seriozajn demandojn al kvaropo da (ne skotaj poetoj, sed ...) rapid-pensantaj kaj sprite parol-emaj diverslandanoj: Graĵina Opulskienè, Jakvo Schram, Marteno Miniĥ kaj István Ertl. Kiel finiĝis tiu kvizo, kaj kiu el la

Dekstre: Clare Hunter, John Wells kaj Tim Owen dum la Jarkunveno. Sube: István Ertl kaj Ed Robertson respondas al demandoj.



konkursintoj venkis, mi (pro bedaŭrata neceso frue foriri) ne scias, sed ĝia komenco ja promesis pluan ridregalon.

**Nu, ĉu senescepte 'kun' – aŭ ankaŭ kelkriate 'sen'?** Nur tiu ne eraras (kiel prave diris Zamenhof) kiu neniam ion faras.

Mi tial ne dubas, ke iu kongresano, iam dum la semajnfino, trovis ian kaŭzon grumbleti. Estus tamen ne nur nejuste, sed ankaŭ praktike senrezulte, postevente direkti siajn plendojn al tiuj, kiuj streĉe penadis – kaj preskaŭ sukcesis – krei perfektan kongreson. Eventualajn

Fotis Terry Page



Supre: Ĉe la amuza Kvizo, gvidata de Rolf Fantom. Sube: Jakvo Schram prelegas pri la vaporŝipa kompanio "Red Star Line: Vojo al Feliĉo?"

Fotis Terry Page



Fotis Terry Page


## KUNKONGRESO

konsilojn pri plibonigo do ricevu organizantoj de kongresoj estontaj. Al la organiza skipo de ĉi-jara Kunkongreso ni diru nur: 'Koregan dankon!'

Terry Page



Fotis Terry Page



Filmado amatora; Tim Owen reĝisoranta; superrigardo al la parlamentejo; kaj Francesco Maurelli pianludas.

### ... kaj iom pli pri la 'Kunkongreso'

- **Oficiala nombro**

La oficiala nombro de partoprenantoj en la Kunkongreso de EAB kaj EAS estis 90, el entute 15 landoj.

- **Nova reprezentanto de ILEI**

Jam dum pluraj jaroj neniu pretis transpreni la rolon de brita reprezentanto de nia internacia instruista organizaĵo ILEI. EAB do provis ludadi tiun rolon dum tiuj vakaj jaroj, sed en la Brita Kongreso Elizabeth Stanley konsentis ekfunkcii kiel la nova reprezentanto de ILEI. Koran dankon al Elizabeth – kaj sukcesan laboron! Dum la ĵus-pasintaj jaroj ILEI pruviĝis tre sukcesplena en ĉiuj mondopartoj.

- **Danko al la Komitato de EAB**

Fine de la Jarkunveno Helen Fantom proponis dankon al la Komitato de EAB pro ĝia bona laborado dum la foje malfacila pasinta jaro. Tion varme akceptis la ĉeestantoj unuanime.

- **"Tiel ni ĉiuj gajnas"**

Iu komentis pri la kongreso: "Aparte plaĉaj estis la bonaj eĥosonoj ricevitaj pri la kontribuoj de la gejunuloj. Marteno Miniĥ certe faris grandan impreson, multaj alte taksis la version de *La Espero* de Rob Hawkins, kaj mi treege ĝuis la kvizon, kiun faris Rolf kun la invititaj eksterlandanoj." ... kaj "Kiam tiuj, kiuj havas kaj la talenton kaj la deziron laboregi kviete en la fono tiel faras, ni ĉiuj gajnas."

Maldekstre: Scenoj el la bankedo en restoracio Iglu. Dekstre: Diskutado ĉe la librobudo



## ***A lot has happened ...***

A lot has happened since the last update from the Management Committee, which appeared in *EAB Update* No. 56. The trustees have met twice; for a four-hour meeting in London on 11 February and for a brief meeting during the joint Scottish and British Congress in Edinburgh, as well as continuing to be in regular e-mail contact.

**Wedgwood Memorial College**  
We were disappointed by Stoke-on-Trent City Council's decision to close Wedgwood Memorial College with effect from 1 April 2012. Following the rejection of the business plan submitted by the Save WMC campaign, the council voted to approve budget proposals which included the college closure. The result is that the buildings at WMC have now been mothballed and are being watched over by a security team. Of course, Esperanto House continues to be open for business as usual, and full use of the Butler Library and Esperanto bedrooms has now reverted to EAB in line with the terms of our lease.

At the time of writing we are exploring new locations for residential courses (see page 9). The trustees will be trying out Fircroft College in Birmingham for their June working weekend and Somera Festivalo will be taking place at Shallowford House in Staffordshire.

### **Houghton Archive**

One practical implication of the college closure was that EAB's Houghton Archive could no longer be stored in the so-called Houghton Room, a storage space previously rented by EAB from the college under an informal agreement which was separate from our main lease. The association is indebted to Tim Owen

and Brian Barker, who travelled to Barlaston at the end of March and spent two days moving the contents of the archive into the Butler Library. The task was made difficult not just by the weight and number of the boxes, but also by the need to keep them in the correct order so that they could still be consulted by our Honorary Librarian Geoffrey King and others. With the help of Geoffrey, the Management Committee are now considering new storage solutions for the

## ***"The British Esperanto Congress 2013 in Ramsgate"***



*Brian Barker and Tim Owen pose with part of the archives of BEA/EAB in the Butler Library at EAB headquarters in Barlaston.*

archive, whether that be installing more shelving in the Butler Library or converting one of the Esperanto bedrooms into an archive room and workspace.

### **Subscription rates**

Something which we discussed both during the February Committee meeting and the AGM in Edinburgh was the issue of subscription fees. The current rates have remained unchanged for many years, and the supporter rate of £10 no longer covers the cost of sending four paper issues of *EAB Update* to the

supporters each year. We are therefore considering what would be the fairest way of changing this situation. Increasing the supporter rate to £15 or introducing an 'online-only' category of membership where supporters do not receive a paper copy of *EAB Update* are just two of the solutions which have been suggested.

We welcome comments and proposals from members (and supporters!) on this theme; please e-mail [clare.m.hunter@googlemail.com](mailto:clare.m.hunter@googlemail.com) with your thoughts. Don't forget that

members and supporters can both save the association money by opting to read *EAB Update* online – just send an e-mail to Viv O’Dunne in the EAB office.

**Finance matters**

The financial statements for the year ended 31 October 2011 have now been approved and the full signed copy is available to view on the Charity Commission’s website. The AGM voted to

make payments to suppliers and reimburse volunteer expenses by electronic transfer rather than being dependent on signing cheques.

**Education and research**

Since our last meeting a successful Buchanan lecture has taken place at Liverpool University. Professor Wim Jansen gave a lecture on ‘Basque and Esperanto – what we can learn from com-

work of all involved, tangible results have been disappointing. No one used the 10% discount code distributed at the event, and the winner of the competition has not been in touch to use their EAB voucher.

The second International Language Festival took place in Sheffield in March. EAB was one of the main sponsors of the event and ran a series of Esperanto taster courses during the weekend (see page 12).

**Congress**

After a successful congress in Edinburgh, we are pleased to announce that the British Congress 2013 will take place in Ramsgate. Thanks are due to Terry Watts, Penny Bryant and Marteno Miniĥ, who have volunteered to organise the event.

**New trustee**

Following the AGM in Edinburgh, we are delighted to announce that Hugh Reid has been elected as a new member of the Management Committee. Hugh is currently getting to grips with the inner workings of the association and will complete his induction during our working weekend in June. Of course, we are still hoping to recruit more trustees for 2013. If you are interested in finding out more about what the role involves, don’t hesitate to contact a member of the existing Committee.

Clare Hunter



*Volunteers Bill Walker and Joyce Bunting again providing EAB’s much-appreciated travelling book service at the successful congress in Edinburgh*

approve the Management Committee’s suggestion not to automatically reappoint Kingston Smith but to investigate the possibility of using a different independent examiner. I am currently in the process of obtaining quotes and am hopeful that we will be able to obtain better service at a cheaper price by using a smaller, more local firm of accountants.

We are also in the process of opening a new bank account with CAF, an institution who specialise in charity banking. Our existing Santander account will remain open for the foreseeable future, but this second account will give us the added flexibility of online banking, enabling us to

paring the incomparable’. We are grateful for the hard work of the Buchanan committee (Ed Robertson, Angela Tellier and Paul Gubbins), without which this would not have been possible.

Angela Tellier has been working hard on a booklet which will present a summary of the findings from the evaluation of the Springboard project. EAB will finance publication of this booklet, which we hope will be published at some point over the summer.

**Publicity**

Despite the very professional organisation of the October 2011 Language Show and the hard

**Verkopremiitoj**

Ĉe la Brita Kongreso oni aljuĝis tri premiojn pro elstaraj kontribuoj al la publikaĵoj de EAB: Jack Warren pro sia artikolo “Murpentraĵoj: Popola arto el Svedujo” en *La Brita Esperantisto*, Susan Badham pro sia raporto pri partopreno en la por-komencanta aranĝo Course-You-Can, aperinta en la retpaĝaro, kaj Hilary Chapman pro sia artikolo “A Visit to Argentina” en *EAB Update*.



# Somera Festivalo 2012:

## New location, new traditions

We are happy to announce that Jack Warren, Viv O'Dunne and Tim Owen have been busy scouting alternative locations to host our traditional *Somera Festivalo*. All three are extremely satisfied with Shallowford House in Stone, Staffordshire, which is around five miles away from Stafford train station. Viv has liaised with the staff and even visited the venue, reporting that "I can't tell you how lovely these people are. Nothing is too much trouble."

The Somera Festivalo will run from **13 to 17 August** under the watch of the very experienced Jack Warren. The activities will be appropriate for *progresantoj* and *progresintoj*. Arrival time is from 11.30 a.m. and the course will commence with a lunch on Monday, the 13th.

### Visit to EAB office and library

Since Shallowford House is only 9 miles away from Esperanto House, we're hoping to build a visit to the Library and Office into the programme. The cost of the course, which finishes on Friday the 17th after lunch, is £264. This includes all tuition



*Shallowford House estas okulfrapa, 19-jarcenta konstruaĵo. En 1938 oni donacis ĝin al la Diocezo de Lichfield por uzado kiel trejnejo kaj ripozejo. Poste oni decidis bonvenigi ĉiujn homojn.*

*La nuna celo de la domo estas provizi per konferenca kaj ripoza centro por kunvenoj kaj sociaj renkontiĝoj.*

*La domo povas loĝigi grupojn de ĝis 38 personoj kaj akcepti konferencojn de ĝis 60 partoprenantoj. La loĝigo estas en ĉambroj kun unu lito, du litoj aŭ du-persona lito; la plimulto de ĉambroj havas banĉambbron aŭ duŝon.*

*La domo situas en du hektaroj da izolitaj ĝardenoj, arbaro kaj*

*herbejo en la ondanta kamparo de Staffordshire, nur 3 mejlojn for de la aŭtoŝoseo M6 (Forkejo 14).*



fees, a continental breakfast, morning coffee, two-course lunch, afternoon tea and cake, plus a three-course evening meal. As with Wedgwood Memorial College, attendees won't be confined to buildings but will enjoy beautiful and extensive natural surroundings. You'll find photos of the lawn, summer-house, animals and more on the website: [shallowfordhouse.org](http://shallowfordhouse.org).

Taxis from the station to Shallowford House cost £10, so consult with Viv (tel. 0845 230 1887) to synchronise your arrivals and split the cost, and to pay the deposit of £50. You'll find travel directions in the accompanying leaflet. □

# 'Karmemora' John Francis

## 1924–2012

*A talk presented to the literary and philological Ours Club, of which John Francis was a member, on 17 May at the Glasgow Art Club (slightly adapted).*

John Francis is remembered not just fondly as a person, which he is, but also as one of the most outstanding authors in the Esperanto world.

His best friend at school, William Auld, went on to become the greatest Esperanto poet of the past fifty years, and it was he who convinced John to learn Esperanto. John wanted to learn Spanish, because of the cowboy novels which he read avidly as a youngster. He tried to persuade Auld to learn it too. Auld agreed on condition that John first learned Esperanto. John kept his part of the bargain, but we don't know if Auld ever kept his. Nevertheless, having learned Esperanto John was to become one of its greatest lights. It's no exaggeration to say that he was up there with the Shakespeares of the Esperanto world.

For those of you who only vaguely know what it is. Esperanto is a created, neutral language for international communication, designed on purpose to be as easy as possible to learn. In modern terms it does what it says on the tin. But it is also a literary language, with great and flexible power of expression. I can say this is true but it doesn't convey what Esperanto is like. I like to think of it as a bit like being in love: until it happens to you, you don't know what it feels like; similarly, unless you've experienced the thrill of being in command of the expressive power of Esperanto, you can't know what it feels like. John Francis was is full command of the literary, creative and expressive power of Esperanto.

Both John and William Auld served in the RAF during World War II and afterwards their friendship rekindled when they joined with two other Esperanto poets, John Dinwoodie and Reto Rosetti, to write poetry which would eventually be published in the seminal work *Kvaropo*. John's contribution to that was a single long poem in five chapters, *La Kosmo*, running to 25 pages.

*La Kosmo* describes in verse the origin of the universe from a "vakua firmamento" through the birth of stars and galaxies, the formation of planets, the evolution of life leading to the dominion of humankind, onto the inevitable death of our sun and the universe itself. The cycle finishes with the same line which opens the poem "senvive sin etendas vakua firmamento". This poem was John's debut on the literary scene.

John once described to me how he, William Auld and Reto Rosetti would gather at weekends in Rosetti's house in Troon, to talk about their poetry, the language Esperanto, and to try out ideas on one another. They would regularly stay up all night with their discussions, smoking and drinking coffee to keep them going till morning. That's the kind of dedication which makes someone of John's literary stature. It culminated in *Kvaropo*.

John moved on to prose and in 1960 published *Vitrulo*, a collection of widely different stories – thus stained glass – some of them sharply satirical and set in an imaginary country, Juglando, and its neighbour, Ruz

– John had a sense of humour. One story, "La Tuŝo de Morto", set in the real world, draws on his experience as a gunner aboard a WWII bomber. It contains details which could only come from experience. For example, he describes how, when the gun turret turns round fully, the back is no longer protected by the fuselage. The only thing separating him from falling out is the thin metal of the door behind him, which he can feel being battered by the slipstream outside.

In 1982 John had *Misio sen Alveno* published, a very enjoyable science-fiction adventure which, as one would expect from such an accomplished author, deals, in the imaginary context of the story, with many of the mysteries of the human condition.

*Tri Rakontoj pri la Miljara Paco* came out in 1997, a humorous political fantasy in which he revisits Juglando and Ruz. These are merciless satires of what John hated most: the duplicity of politicians and social injustice.


John once told me that it bothered him that while there were original novels in Esperanto for adults and also for young children, there were none for older children and young teenagers. So he set about writing one, and in 2004 *La Kastelo de Vitro*, a magical fantasy adventure in a parallel world, was published. It is a tribute to John as an author that his mastery covered so many different genres so successfully. In discussing the book once with him, I told him that the scenes in the parallel world seemed just too perfect. He replied that, yes, that was his intention. Apart from feeling a bit stupid, I

thought, what a testimony to his skill that he achieved that without the reader being aware of the literary devices he used.

His book *Kronprincedzino* has just been published by Flandra Esperanto-Ligo. I can't say anything about it because I haven't read it yet.

His masterpiece *La Granda Kaldrono* was published in 1978. The novel deals with the lives of two Glasgow families over two generations spanning the two World Wars. It is a beautifully written and thoroughly readable piece of fiction. John shows a deep understanding of the human heart, of the desires and needs which motivate us to do the things we do and make us the way we are; from the fretted fussing of a young woman picking her clothes for her first date, to the selfless refusal of a soldier in the trenches to take a promotion which would save him from his eventual death under enemy fire. Again, John draws on his own war experience in a chapter where a young trainee pilot flying in Canada becomes lost in mountainous terrain as the clouds descend. After flying around aimlessly in increasing fear, he finally lands at an aerodrome many miles from his base. John once told me that he put that chapter in as a metaphor for the aimlessness of life, which is the main theme of this his *Grand Oeuvre*.

His last-but-one book was published in April this year by the Scottish Esperanto Association. It is a collection of poems, some already published elsewhere, but a good number not previously published. Among them is 'La Kosmo (reviziita)'. It consists of two tiny poems of a verse each. I think this is his sense of humour showing through by mocking the arrogance and pretentiousness of his own youth. A five-chapter, 25-



page poem revised as one verse of six words!

John was well known among Esperantists internationally, often attending world congresses. For many years, however, he wasn't at all active in the movement until in 2004, when, virtually unannounced he turned up at the Glasgow Esperanto Society, where we first met him. Although reserved, those who got to know him found John to be a deeply human, compassionate and humorous man.

It is sad that someone who was such good company is gone from us, but for the Esperantists at least, he has left us in his writing a truly delightful legacy. So in the name of all Esperantists, I would like to thank you for the gift of your life and literature, John Francis, *karmemora*.

Hugh Reid

#### John Islay Francis – a few memories

John was a literary figure of the greatest importance within the Esperanto world; but I prefer to leave to others the task of analysing his extraordinary achievements as poet, novelist, short-story writer and as a talented translator, only mentioning his great pride at being a member of the Scottish School.

John finished his career as an English teacher in the Orkney Islands; after his retirement he returned to Glasgow where he lived quietly until David Kelso tracked him down and persuaded him to attend the Glasgow Esperanto Society. He remained the most faithful of members until his death.

A visitor would never have guessed that such an eminent Esperantist sat among the mem-

# EAB refoje ĉe la Internacia Lingva Festivalo en Sheffield

Post sia ĉefrolo en la starigo de la unua Internacia Lingva Festivalo ĉe la Universitato de Sheffield, EAB denove finance subtenis la studentaran skipon kiu en marto okazigis la duan. Vizitantoj dum la semajnfino de la 17a kaj 18a de marto havis eblecon partopreni multajn gustum-sesiojn pri diversaj lingvoj inkluzive de la mongola, la rusa, la korea, ... entute pli ol cent lingvoj disponeblis!

## Esperanto en favora situacio

Pro la bona rilato inter EAB kaj la organiza skipo, Esperanto estis en aparte favora situacio kaj do disponis pri tri gustum-sesioj sabate (du dimanĉe) kaj po unu speciala prezento 'Kiel lerni Esperanton?' ĉiutage – pli da sesioj ol de iu ajn alia lingvo.



Tim Morley prezentas la lingvon, uzante la brilan tradukon fare de William Auld de 'The Tyger' de William Blake.

Gastigis la sesiojn sabate Tim Owen kaj dimanĉe Tim Morley, ĉiuj uzante la grandajn ekranojn, kiujn disponigas universitatoj

por montri buntajn prezentojn. Aparte interese estis, ke homoj en la dimanĉaj sesioj

bers. He always made light of his achievements as a result of true humility and a conviction that nothing which he had ever done was perfect. Yet his ability became obvious when he participated in the club programmes. John regarded the smallest contribution as important: he always read from a typescript, for every contribution was a work of literature and had been honed, polished and revised before he read it aloud. He shamed those of us who so often extemporised.

John on occasions exaggerated our ability to understand; he was indeed a modern metaphysical thinker: every word counted! But when he spoke with the most ordinary of Esperantists, his conversation was marked by profound simplicity and genuine rapport: no one was ever intimidated.

On occasion John was asked to do translation work for various events: he never refused – never was reluctant – and always produced something of the highest quality, even though he claimed that his literary career belonged to past days.

John was no arid intellectual; he was warm-hearted, humorous, a repository of anecdotes – especially concerning his youth.

It was discovered that he had some unpublished poems. The Scottish Esperanto Association agreed to publish them. John had a multitude of ideas concerning the physical appearance of the little book and the precise formatting of the poems. Work continued until a few days prior to his death.

*La Danco de Vivo* is a worthy memorial to a remarkable man.

David W. Bisset



propraorele aŭdis fluan paroladon en Esperanto, ĉar Tim O kaj Tim M petis paroltemojn de la spektantaro kaj poste rapidege babilis inter si. Tiel konstatis la ĉeestantoj, ke Esperanto ne estas simple teoria projekto, sed flue parolata lingvo, taŭga por konversacio pri ajna temo.

## Vice staris por pliaj informoj

Pozitiva flanko estas, ke la plimulto en la ĉambro post la sesioj vice staris por kolekti flugfoliojn, kvizon kaj informo-diskon. Ĉu ili poste lernos Esperanton, ni ne povas garantii, sed ni povas esti certaj, ke ili lasis la prelego-ĉambregon kun bona impresio pri la lingvo, pri kiu ili nenion sciis antaŭe. □

## ***EAB wins Premio Cigno Paddling furiously, a serene prize-winning performance***

Every year since 1995 the Japanese philanthropist Etsuo Miyoshi has made an award for outstanding contributions to spreading knowledge about Esperanto. Originally the award, a substantial cash grant, was restricted to the developing countries, but last December he formalised the arrangement by setting up the *Fondajo Cigno* (Swan Foundation), with a wider remit to award the *Premio Cigno* (Swan Prize). The 2012 prize, a grant of 200,000 yen (about £1600) to be used for publicity purposes, was awarded for the most outstanding achievements in 2011 in the field of publicity for Esperanto, and all national associations in the European Union were eligible to enter for it.

And who won it? EAB did! And who is largely responsible? Our own Brian Barker.

What are the highlights of Brian's activities in this regard? He engineered the appearance of positive articles about Esperanto in the *Economist* and *The Daily Telegraph* and in many other places. He was instrumental in setting up a Radio Four interview with Hilary Chapman on the Today programme (seven million listeners), in celebration of 'Esperanto Day', an idea of Brian's that also triggered interviews with members of EAB on local radio all over the country, including one in Scottish Gaelic.

Brian also took on the role of publicity for the International Languages Festival organised by students of the University of

Sheffield. This too resulted in a considerable number of reports in the media, including a TV appearance by Marcus Henoah on the BBC Breakfast programme.

As with a swan swimming serenely along, a beautiful result

depends on hard work that you can't see.

So congratulations all round – and particularly to our publicity genius Brian for all his sterling work, to Viv O'Dunne in the office for her professional assistance, and to our secretary Tim Owen for doing Brian's efforts justice when submitting the prize application.

John Wells

---

### INTERNACIAJ RILATOJ

---

### INTERNATIONAL RELATIONS

---

## ***UEA en "konsulta partnereco" kun Unesko***

Universala Esperanto-Asocio fariĝis konsulta partnero de Unesko, la Organizaĵo de UN por edukado, scienco kaj kulturo. Tiel decidis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ino Irina Bokova, konforme al la novaj gvidlinioj pri la rilatoj de Unesko kun Neregistaraj Organizaĵoj (NROoj), kiujn la Ĝenerala Konferenco adoptis en novembro. Fakte, laŭ la novaj gvidlinioj ne plu temas pri rilatoj sed pri partnereco por pli bone esprimi, ke Unesko celas kunlabori kun NROoj por la komunaj celoj kaj ne nur formale rilati kun ili. Por Unesko NROoj estas gravaj, ĉar pere de ili ĝi rekte atingas la civilan socion preter la ŝtataj strukturoj.

UEA havas oficialajn rilatojn kun Unesko ekde 1954. Antaŭe estis tri kategorioj: apud la plej alta el ili, formalaj asociaj rilatoj, ekzistis formalaj konsultaj rilatoj

kaj operaciaj rilatoj. UEA troviĝis en tiu lasta kategorio. Ekde nun estas du kategorioj: asocia kaj konsulta partnerecoj. En la unua estas akceptataj nur malmultaj grandaj NROoj por periodo de ok jaroj. La konsulta partnereco ne estas tempe limigita, sed la koncernaj NROoj devas montri konstantan aktivecon kaj daŭre kontribui al la agadoj de Unesko je ties plena kontento. Por ke la partnereco estu sur firma kaj serioza bazo, Unesko asignas ĝin nur al NROoj, kiuj havas establitan centran oficejon kaj plenumas ankaŭ aliajn postulojn.

La plej longedaŭra kontribuo de UEA al Unesko estas la eldonserio *Oriento-Okcidento*, en kiu ekde 1961 aperis 49 elstaraj mondliteraturaj verkoj en Esperanta traduko. UEA esperantigis kaj eldonis ankaŭ librojn kaj aliajn materialojn de Unesko. La temo de la Universala

Kongreso (UK) estas ofte ligita al speciala jaro aŭ jardeko de Unesko, kaj la temo estas pri-traktata en kongresaj programeroj. Multaj UKoj ricevis mesaĝon de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, laste la 96a UK en Kopenhago. UEA partoprenis en diversaj kampanjoj de Unesko, ekz. en la kolektado de subskriboj por la Manifesto 2000 por Kulturo de Paco kaj Senperforto ĝi estis inter la plej aktivaj NROoj.

Pro sia oficiala statuso, UEA havas pli facilan aliron al la

Ĝenerala Konferenco kaj aliaj aranĝoj de Unesko. La plej elstaraj kaj daŭre valoraj atingoj de UEA ĉe Unesko sendube estas la rezolucioj de la Ĝeneralaj Konferencoj en Montevideo en 1954 kaj en Sofio en 1985, kiel la internacie plej gravaj rekonaj al Esperanto kaj Universala Esperanto-Asocio.

La konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe la sidejo de Unesko en Parizo estas Renée Triolle, Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo. Unesko estas en oficiala partnereco kun 368 internaciaj NROoj. ▣

• “Modela kunveno”

Estimataj,

Mi vojaĝis de Germanio al la Edinburga kunkongreso por mia unua vizito al Britio. La kongreso mem estis ekzemplodona, modela kunveno de la unua ĝis la lasta programero.

Akceptu mian sinceran gratulon pro la preparlaboro de via skipo kaj via komuna sukceso teni tiun altan nivelon dum la tagoj de la konferenco. Mi neniam forgesos.

Reinhard Wagner,  
Wolfenbüttel, Germanio

*Dum la kongreso foje vidiĝis kamero kaj filmisto (vidu paĝon 6), ĉar s-ro Wagner ‘ĉefrolis’ en amatora filmo pri “maljuna esperantisto, kiu unuan fojon vizitas Brition”.*



• Dankon, karaj samideanoj

Estimataj,

Internaciaj renkontiĝoj, kongresoj estas vere freŝa afero en nia Esperanta vivo. Mia partopreno en la Brita kaj Skota Kunkongreso estis neforgesebla kaj plena de impresoj. Bonega programo, ekskursoj, kiuj estis interesaj kaj informplenaj, precipe por tiuj, kiuj unuan fojon vizitas unu el belegaj landoj de Eŭropo, montris, ke renkontiĝo estis organizita altnivele.

Por mi estis bona ekzemplo por studi sperton de anglaj kaj skotaj samideanoj dum balotado de Esperanto-Asocio de Britio. Mi ĝojis, ke britaj esperantistoj estis tiel aktivaj, sendepende de aĝo. Tre interesajn temojn prezentis István, Gražina kaj Marteno (pri slango). Dum mia vojaĝo mi akiris novajn geamikojn.

Dankon, karaj samideanoj pro via sukcesa kaj interesa renkontiĝo, kiu montris, ke Esperanta agado en viaj landoj prosperas!

Nvard Manvelyan, Armenio

## Eŭropa Komisiono de UEA ekveturas

Jam dum jaroj oni proponis, ke la Esperanto-movado en Eŭropo havu sian komisionon de UEA. Ĉiu alia mondoparto havas sian, kies taskoj inkluzivas helpi en la organiziĝo kaj informado, kie la movado aparte malfortas.

Post diskutado dum la Universala Kongreso de 2011 en Kopenhago, Eŭropa Komisiono de UEA ekvivis. Dank’ al baraktadoj de Maritza Gutiérrez, estrarano de UEA pri Landa Agado, kaj de Ileana Schroeder, prezidantino de Dana Esperanto-Asocio, oni formis aktivularon pretan komisionumi.

**Prioritato: Albanio**

La estraro de UEA formale aprobis, en sia kunveno en Roterdamo inter la 29a de aprilo kaj 1a de majo 2012, ĝian fondon, per jenaj vortoj:

“Rilate la organizan laboron, la estraro akceptis la decidon pri fondo de la Eŭropa Komisiono kun la propono, ke ĝi unue okupiĝu pri la Esperanto-movado en Albanio.”

La aliaj laborkampoj estos: kontaktado kun iuj eŭropaj landaj asocioj; helpado al la landaj asocioj rilate al la agadoj de informado, instruado kaj organiziĝo, kaj aparte pri la iniciatoj de UEA en tiuj kampoj; helpado al la iniciatoj de EEU, kiuj bezonas la subtenon de esperantistoj tra la landoj. Aliaj laborkampoj estos i.a. Projekto 125, Projekto Malto, ĝemelaj urboj.

(Informis Aleks Kadar,  
Kunordiganto de la Eŭropa Komisiono)

### Penpal wanted

“My name is Frances Worrall and I’m currently learning Esperanto. My interests are pretty general, mainly foreign languages. I’d appreciate a penfriend that would correspond with me in Esperanto. Write to me via the EAB office.”



• Armenia semajno junia/julia

Karaj samideanoj,

Ĉu vi scias pri la 2a Internacia Esperanto-Semajno en Armenio? Se ne, bonvolu viziti: <http://area.am/?ID=12>; pri antaŭaj kaj postaj ekskursoj <http://area.am/?Lng=1&ID=5>.

Por ke vi povu imagi, kiel vi povus pasigi la tempon en Armenio vizitu: <http://area.am/?ID=15>.

La Semajno estos dediĉita al la 125a datreveno de Esperanto kaj 500a datreveno de la armena presita libro en 2012. La temo estas: "La libro kiel rimedo de kultura dialogo".

Unesko proklamis Erevanon Internacia Ĉefurbo de la Libro por 2012. Venu kaj malkovru antikvan Armenion.

Ĝis la renkontiĝo en la Erevana flughaveno Zvartnoc!  
Susanna Baghdasaryan,  
Prezidanto de Armenia  
Esperantista Unuiĝo



Ĉu vi emas instrui rete?

Saluton!

La lingvotrejna retpaĝaro [www.languagetrainers.com](http://www.languagetrainers.com) volas reklami siajn servojn per mia retejo [www.mondeto.com](http://www.mondeto.com). Mi ne volas permesi tion, ĉar ĝi ofertas instruadon de multaj lingvoj, sed ne Esperanton.

Tamen, mi emas respondi, ke mi ja permesus la reklamadon, se ili aldonus Esperanton al sia listo. Mi supozas, ke la respondeculo respondos, ke Esperanto-instruistoj mankas al ĝi.

Do, ĉu iu el vi pretas registri vin kiel dungeblaj, kaj pageblaj, Esperanto-instruistoj? La paĝo estas [www.languagetrainers.com/online\\_lessons/trainer\\_application\\_1.php](http://www.languagetrainers.com/online_lessons/trainer_application_1.php).

Se mi ricevos pozitivajn respondojn al tiu demando, mi

daŭre negocos kun ili, kaj ni kune faros tre utilan paŝon por la disvastigo de Esperanto.

Penny Vos

Rete: [CEO@mondeto.com](mailto:CEO@mondeto.com)

Tel. +612 6493 2992

Skype: Penelope Vos

[www.mondeto.com](http://www.mondeto.com)



House of Commons Library

Dear Mr Barker,

Thank you very much for your invitation to Mr Pullinger inviting him to attend the Esperanto Parliamentary Group meeting on 10th July this year. Unfortunately Mr Pullinger will be unable to attend on the 10th July but we would be very pleased to accept a donation of the *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* by Geoffrey Sutton.

Please can you ask the author to send me a copy of the book (to the address at the foot of this letter) and I will arrange for it to be added to Library holdings.

Katharine Marke

Head of Library Resources

House of Commons Library



• "All success to you"

Dear Mr Barker,

I am very interested in Esperanto and if only a few years younger I would take it up very seriously. At the age of 89 I am afraid I am really past it.

All success to you.

Sir Patrick Moore, CBE, FRS



• Liberal apology

Dear Brian [Barker],

First of all my apologies for the delay in responding to your letter of 9 March. Second, my apologies for my slur against Esperanto in a recent speech. That I was quoting from a speech of a colleague is not an excuse. Even as I said it I thought that I would regret it.

I am grateful for the information you sent me about Esperanto and its continuing vigour as a living language.

Tom McNally,

Leader of the Liberal Democrats,

House of Lords, Westminster



**Libroj de Claude Piron  
senpage disponeblaj**

Laŭdojn meritas Edmund Grimley Evans, kiu antaŭ nelonge kontaktis la vidvinon de grandioza kontribuinto al Esperanto Claude Piron, por permeso meti en la reton ekzemplojn de liaj libroj. Nicole Piron afable konsentis, kaj do la temporaba tasko skani, kontroli kaj prepari ekiĝis. Edmundo rapide metis sin al la laboro kaj nun pretas kvar libroj.

Interesitoj nun povas elekti legi *Ĉu vi kuiras ĉine?*, *Ĉu li bremsis sufiĉe?*, *Ĉu li venis trakosme?* kaj *Ĉu ni kunvenis vane?* senpage per normala ttt-legilo aŭ eĉ elekti elŝuti por legi per legoplato, ekzemple per Kindlo. Nun la verkoj de Claude Piron (nu, Johán Valano, la pseŭdonimo!) pluvivas kaj disponeblas senpage por ĉiuj post la forpaso de la karmemora verkinto. Tiujn kontribuojn Edmundo kutime faras diligente dumnokte kaj senfanfarone, kaj ni en la Administra Komitato deziras sciigi tion al la membroj de EAB. La tekstoj troviĝas ĉe [www.rano.org/piron](http://www.rano.org/piron).

# Lastatempe okazis

[www.jeb.org.uk](http://www.jeb.org.uk)



*Marteno Miniĥ stangopuŝas boaton plenan de JEB-anoj.*

## Elekto de komitatoj

La ĉeestantoj de la JEB-jarkunveno en Kembriĝo aprobis novan konstitucion por la asocio (legebla ĉe nia ttt-ejo). Ekde nun JEB havos du prezidantojn, kiuj estos ĉiu dum duona jaro. La ideo malantaŭ tio estas pli demokratigi kaj energiigi la organizadon. La komitato por la jaro 2012–13 konsistas el Daniel White (Prezidanto dum la 1a duonjaro), Dudu Castellani (Prezidanto dum la 2a duonjaro), Rowland Goodbody kaj Jake Pentland.

Decidiĝis, ke la venonta renkontiĝo okazos en Liverpolo inter la 22a kaj 24a de junio. Okazis vizito de kelkaj londonanoj al Liverpolo en februaro, kaj ĉi-foje ni atendas aliĝon de kelkaj aliaj, kiuj ne povis partopreni pasintfoje (inkluzive de mi!).

## Skota Kongreso

Ĉeestis boneta grupo de JEBanoj ĉe la kongreso en Edinburgo. Laura Dickson kaj Francesco Maurelli helpis ĉiĉeroni dum la renkontiĝo, kaj ĉar Franciso estas lokulo, lia apartamento fariĝis amasloĝejo. Estis nove esperantistiginta membro el Nordirlando, Brian Shannon, kiu vojaĝis unuafoje per NoJEF. Ni proponos al li, ke li organizu JEB-kunvenon en Belfasto iam estontece.

Dum la kongreso mem, Marteno Miniĥ prelegis dinamike kaj fluege pri la plej lastatempaj evoluaĵoj de Esperanto, kiel novaj gramatikaj ekz. la prepozicio *na* por montri la akuzativon kaj la pronomo *ŝli*, kunmetaĵo de 'ŝi' kaj 'li', kaj pri aliaj slangaj elpensaj uzataj ĉe junularaj renkontiĝoj. Mi dumlonge ne vidis la utilon de

## JEB en Kembriĝo

La Brita Renkontiĝo de JEB en Kembriĝo estis tre sukcesa, danke al ĉiuj, kiuj organizis kaj partoprenis ĝin. Tre plaĉis al mi boatumado sur la rivero, kie mi povis elprovi depuŝadon per stango kontraŭ la fundo – en Kembriĝo tute kutima sed por mi antaŭe ne konata maniero por movi kaj stiri boaton.

Sekvis prelego de Tim pri la historio de Esperanto, kaj poste la oficiala Jarkunveno de JEB – kiu, malkiel en la pasinto, okazis en Esperanto. Estis elektita nova komitato, kaj estas klare, ke JEB daŭre vivas – restas nur deziri kaj esperi, ke ĝi kresku kaj floru! Kaj do jes, oni jam parolis pri la ontaj renkontiĝoj, kaj do oni povas esperi, ke JEB reakiros sian antaŭan kvaronjaran ritmon de renkontiĝoj.

Poste oni manĝis (kia surprizo!) en la loka Wetherspoons, kie montriĝis, ke oni povas

kontinue resti por nokta amuziĝo, ĉar eksonis tie muziko. Oni ekdancis kaj, nur kiam mi iris repreni bieron, mi konstatis, kiom alia estas la etoso en la resto de la drinkejo kompare kun nia subite maltaŭge trankvila angulo. Pli poste ankaŭ la maldecidema grupo de esperantistoj finfine decidis surtreti la dancejon, kvankam domaĝe, ke granda parto de esperantistoj jam foris.

La postan tagon okazis ĉiĉeronata promeno tra Kembriĝo, kaj poste – profitante de la agrabla printempa vetero – sidado en la parko, kie ni umis la haluŝkan ideon pri Esperanto kun postpozicioj anstataŭ prepozicioj, kaj ĉefe ankaŭ ludis unu homlupan ludon, en kiu venkis vilaĝanoj. Sed precipe estis la tuta JEB kiu venkis per tiu renkontiĝo, kaj ĉiu malĉeestinto povas nur bedaŭri!

Marteno Miniĥ



• **Strategia vizio por UEA**

La dokumento *Strategia vizio por UEA: Analizo kaj rekomendoj de la Komisiono pri la Strategiaj Demandoj* troviĝas jam ĉe la retadreso: [http://uea.org/dokumentoj/index\\_gravaj.html](http://uea.org/dokumentoj/index_gravaj.html). Krome la dokumenton eblas elŝuti per rekta ligilo: [http://uea.org/pdf/Strategia\\_vizio\\_por\\_UEA.pdf](http://uea.org/pdf/Strategia_vizio_por_UEA.pdf).

Oni atendas aktivan diskonigon kaj diskutigon de la dokumento, por ke UEA povu ellabori sian finan strategion por la venontaj jaroj. Bonvolu partopreni. Se vi ne havas komputilon, bonvolu peti per poŝto de EAB aŭ UEA.

• **British Library** ([www.bl.uk](http://www.bl.uk))

The British Library's information leaflet *European Studies at the British Library – Discover books, manuscripts, sounds and newspa-*

*pers from across Europe* specifically mentions their strength in Esperanto.

• **"... la homoj mem komencas argumenti por Esperanto."**

En la maja numero de revuo *Esperanto*, organo de UEA, la direktoro de la Esperanto-Muzeo Vieno komentis:

*"Laŭ nia sperto, ni ne trotaksu la efikon de la argumentado, eĉ se oni havas pozitivajn argumentojn. Mi faris eksperimenton. Dum unu gvidado mi enplektis tutan aron da argumentoj por Esperanto. La rezulto: la gvidatoj komencis kontraŭargumenti. Normale mi ne tiel faras. En tiu kazo la homoj mem komencas argumenti por Esperanto. Ili fine diras tion, kion mi mem volus diri favore al la lingvo."*

Dum la pasinta jaro la Esperanto-Muzeon en Vieno vizitis preskaŭ 10 000 homoj.

• **Top in *The Economist's* poll**

In its series on 'Big Questions', the high-quality British journal *The Economist*, asked the question 'Which language is best to learn?' Esperanto topped their online poll with 27% of votes.

• **Someraj kursoj en Svedio**

De la 8a ĝis la 15a de julio 2012 okazos multe ĉe la konata Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors, trankvila vilaĝo ĉirkaŭita de arbaroj kaj lagoj, meze inter Stokholmo kaj Oslo:

- kursoj trinivelaj: komencanta, daŭriga kaj konversacia
- infana ludgrupo ekde 5 jaroj
- temstuda grupo: alternativaj sanigaj metodoj kaj vivmedio
- praktika kuireja laboro – por lerni kuirejajn terminojn
- ekskurso al lokaj kulturejoj

Kiel kursano vi rajtas inviti viajn familianojn aŭ amikojn veni turismi en la bela regiono Värmland dum la semajno antaŭ aŭ post la kursoj kaj tranokti kun 50%a rabato.

Por ricevi kompletan informilon kun ĉiuj prezoj (la kursoj mem estas senpagaj), skribu al [<egarden@esperanto.se>](mailto:egarden@esperanto.se).

• **Amazon review**

The following personal review, by 'Momerathophilus', of the *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* (2008) appears on the Amazon website: "This solid volume is clearly a labour of love, which must have taken years of painstaking work to compile. It is accessible by both English-reading and Esperanto-reading inquirers and offers a virtually exhaustive treatment of original literary publications in Esperanto down to the date of publication – and its detailed bibliographies for each writer are not restricted only to original publications in Esperanto, but contain also bibliographical details of writers' translation works and publications in other languages, as well

*na*, sed post la amuza prelego de Marteno mi ja fariĝis konvinkito pri naismo!

Veronika Poór mallonge parolis pri sia laboro pri la starigo de la projekto Muzaiko, tuttagan interretan radion en Esperanto. Ŝi senĉese laboras por la projekto, kaj mi ne scias, kie ŝi

trovis la tempon inter sia lasta-tempa doktoriĝo.

Por fini, nia propra rokmuzikisto, Rob Hawkins, bonege kantis por ni la himnon *La Espero* kun memkomponita muziko. Ni tre atendas la surbendigon (aŭ sur-Muzaikigon) de lia versio.

Daniel White

*JEB-anoj kune ludas Tabuon dum sia renkontiĝo en Kembriĝo.*



as sources of criticism and reviews that have been published on the work of Esperanto writers. It is as invaluable tool that will stand a long shelf life and frequent use."

#### • Senpagaj kursoj

Dum limigita tempo du retkursoj de AIS en <http://edukado.net/> klerigejo estos libere alireblaj. Temas pri Astrobiologio (tri lecionoj) de A.Wandel, kaj Interlingvistiko (dek lecionoj) de V. Barandovská-Frank. La du kursoj estas malfermaj por ekstera publiko; oni povas ilin senpage sekvi. Pro teknikaj kialoj necesas tamen membriĝi ĉe la paĝaro edukado.net. Kiu volas ke liaj aŭ ŝiaj rezultoj kaj progreso estu registritaj, povas peti enlistigon ĉe la adreso AIS-kurso@edukado.net.

• **Meksika membraro kreskas**  
Meksika Esperanto-Federacio (MEF) nun fartas multe pli bone

ol antaŭ kelkaj jaroj, kaj oni juĝas la prognozon pozitiva. Pasintjare ĝi havis pli ol 150 membrojn, kaj nun ekzistas instruista kaj junulara sekcioj.

En februaro okazis prezento de la dokumentara filmo de Sam Green kaj Dave Cerf *Utopio en kvar movadoj*. Grupo de esperantistoj partoprenis en la du vesperaj aranĝoj en la Nacia Centro de la Artoj en Meksik-urbo. La ĉirkaŭ 800 partoprenantoj eksciis pri Esperanto ne nur pro la filmo, sed ankaŭ pro postaj agadoj (foto kaj pliaj informoj: <http://www.esperanto-mexico.org/eo/node/641>).

En la urbo Guadalajara aperis granda artikolo en la meksika ĵurnalo *El Informador* ([www.informador.com.mx/cultura/2012/368853/6/guadalajara-parolas-esperanton](http://www.informador.com.mx/cultura/2012/368853/6/guadalajara-parolas-esperanton)).

MEF partoprenis ĉe la 'Semajno de la lingvoj' en la nacia universitato de la meksika

subŝtato Puebla. La agadoj estis informstano, prelego kaj tri-hora kurso de Esperanto.

MEF prezentis Esperanton dum la 'Tagoj de la lingvoj' en la nacia gimnazio UNAM 7. Okazis prelego kaj tri kursetoj.

Du esperantistoj partoprenis en la konata kultura aranĝo *Huevos revueltos* (kirlitaj ovoj). La temo, kun diskutado, estis 'Poŝtmarkkolektado kaj Esperanto'.

(Informis Martin Schäffer.)

#### • Tajvano: Element-lernejoj studas per [www.lernu.net](http://www.lernu.net)

En la sudo de Tajvano kaj en la urbo Pingtung estas kurso de Esperanto kun dek du lernantoj, kiuj lernas kadre de kluba agado de la lernejo. Ili aliĝis al Lernu.net por memlernado kaj internacia kontakto. Flora Chen kaj Ingrid Chuang, lokaj esperantistinoj, helpis pri tio. Filmeto videblas ĉe [www.youtube.com/watch?v=i9xso75NujM](http://www.youtube.com/watch?v=i9xso75NujM). □

## Nekrologoj – Obituaries

La 30an de aprilo forpasis **Rik Dalton**, aktivulo dum pli ol 60 jaroj. Li estis 87-jaraĝa. Interalie li aktivis en la gazetara ĵurio *Press Panel*, sukcesis konsentigi lokan registaron enkonduki Esperanto-lecionojn, kiujn li mem gvidis, kaj intervjuis pri Esperanto la Ministrin pri Instruado.

**John Francis (1924–2012)**. See pages 10–12.

**Richard (Dick) Phillips** mortis en februaro post longa batalo kontraŭ kancero. Li havis bonan edukon kun diplomo pri astrofiziko, kaj faris multan libervolan senpagan laboron ĉe la muzeo de Herschel en Bath, kie li instruis iun ajn, kiu venis por viziti. Li ankaŭ ludis la orgenon kaj poste lernis ludi la liuton. Li kantis kun iu aŭ alia ĥoro dum sia tuta vivo. Li komencis kiel instruisto, sed poste transiris al komerca firmao por labori kiel esploristo. Tamen, li havis tre bonajn personajn lertojn kaj do iĝis vendisto. Ĉirkaŭ la tempo kiam li trovis la kvakerojn, li trovis ankaŭ Esperanton. Proksime al la fino de sia vivo, li komencis grupon pri Esperanto en la U3A (Universitato de la 3a Aĝo) en Bath – grupo, kiu ankoraŭ ekzistas. Li estis homo de multaj partoj – idealisto, kiu mankos al ni.

Andy Pepperdine

La 19an de marto pace mortis **Belalumo Kwang Mi Rawlinson** en Malsanulejo Whipps Cross. Ni elkore kondolencas al edzo Anthony kaj la du junaj gefiloj. La enterigo okazis la 3an de aprilo en Wanstead. Memore, la familio petis donacojn al Macmillan Cancer Support (Melskham SN12).

Ni bedaŭre ricevis de lia filo Karlo informon, ke **Alfred William 'Vilĉjo' Rowe**, longtempa membro de BEA kaj EAB, forpasis la 4an de aprilo 87-jaraĝa. Vilĉjo delonge aktivis por Esperanto, eĉ pasintjare kontribuante interesan artikolon al *La Brita Esperantisto* por pensigi al okcidentuloj kiel nia vortelekto povus obliĝi problemojn por neeŭropaj esperantistoj. Niajn kondolencojn ni sendas al lia familio.

## NOEF kore invitas al sia Aŭtuna Kunveno en Chester

Ni kore invitas vin al nia Aŭtuna Kunveno 2012, kiu okazos je sabato, la 6a de oktobro en Hotelo Westminster, City Road, Chester CH1 3AF (tel. 01244 317341). La hotelo troviĝas nur kelkajn metrojn for de la stacidomo.

Alvenu post la 11a horo: ni komune sociumos en la baro Deva, kie krom trinkaĵoj oni povos ankaŭ aĉeti biletojn por la loterio, kaj eventuale novajn kaj brokantajn librojn kaj esperantaĵojn. Je la 12h30 oni servos abundan – kaj tre laŭditan! – bufedan tagmanĝon. Vegetaraj kaj veganaj pladoj haveblas laŭ antaŭmendo.

Post la lunĉo ni kunvenos en alia ĉambro por mallonga aferkunsido. La ĉefa ero de la programo estos la parolado memore al Antonia Rostron-Van Ess, fare de Jack Warren. Sen-dube tio estos amuza kaj informa prelego de klara kaj klera parolanto – aktivulo en la loka movado kaj populara instruanto kaj distranto ĉe Barlastono.

Oni proponos teon/kafon kaj biskvitojn post la parolado. Okazos eltirado de la loteribiletoj – tiam ni povos gaje aŭ

triste interbabili ĝis venos la horo por disiĝo, ĉirkaŭ la 4h30.

Aliĝu poŝte al Barlastono, aŭ prefere rete ([www.esperanto-gb.org](http://www.esperanto-gb.org)). La kosto estas £16,50 inkluzive de la menciitaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Nepre menciui, se vi volos manĝi vegetare. Se eble, bonvolu uzi debetkarton por via mendo (ĉar niaj procentaĵokostoj estas malpli grandaj kun debetkartoj, tiel pli granda proporcio el via pago iros al la federacia kaso.) Por vidi la kondiĉojn de perretaj mendoj kaj pagoj, vidu la libroservan paĝon de la retpaĝaro de EAB. La ĉi-supra ero ne havas sendokoston.

Se vi volas mendi kune kun via mendo librojn aŭ varojn el la libroservo de EAB, metu ankaŭ tiujn en la 'butikĉaron', antaŭ ol iri al la *checkout* t.e. pagejo.

La limdato por aliĝi estas la 30a de septembro, kiam ni devos sciigi la hotelon pri la preciza nombro da partoprenantoj. Venu amase al bela, interesa Chester!

(Bv. noti: Ni tre bonvenigos premiojn por la loterio, ankaŭ librojn kaj aliajn esperantaĵojn por disvendi profite al la Federacio.)

Por informoj aŭ helpo – ankaŭ en Chester – kontaktu: tel. 07703 310 610.

## Festi en suda Londono

Por festi la 125an jubilean jaron de Esperanto, la Sud-Londona Esperanto-Grupo organizas dum la posttagmezo de la 7a de julio Somerfestan aranĝon ĉe Unity Centre of South London (2-4 Ravenstone Street, Balham, SW12 9SS).

Kiel kutime, haveblas manĝaĵoj, trinkaĵoj – kaj estos muziko kaj distraĵoj, espereble eĉ malgranda ekspozicio pri Esperanto. La celo estos ne nur por ni esperantistoj renkontiĝi, sed

ankaŭ, kaj precipe, por informadi pri la lingvo kaj allogi interesitojn, kiuj deziras pli da informoj kaj eble komenci lerni. Ni intencas meti multajn afiŝojn kaj anoncojn en la lokaj bibliotekoj kaj ĵurnaloj. Ni estas la 'jam konvertitaj', do ni disvastigu la mesaĝon al aliaj, ke Esperanto estas vivanta, utila kaj necesa lingvo por tutmonda komprenado!

Gregory Porilo

### New Members of EAB

Andre Dandy, Ainsdale  
Wieslaw Klak, Woolston  
Steven Lynch, Bridgend  
Pamela Stenning, Christchurch

### Deceased members

John Francis, Glasgow  
R. Phillips, Bath  
Vilĉjo Rowe, Hitchin  
Doreen Winterburn

### CONGRATULATIONS

Completed the Accelerated Course

David Fuller, Bath

## Revival of Birmingham group?


Efforts are being made to revive Esperanto meetings in Birmingham – see the new web page which “still needs some work, but it’s a start”. If you live in or near Birmingham, have a look and make contact – <http://www.facebook.com/pages/Birmingham-Esperanto-Club-Esperanto-Klubo-de-Birmingham/322225651129311>.

## Festi jarfine ĉe la 29a Internacia Festivalo

Dortmund, la 'enirpordo' al la Rura regiono, bonvenigas vin! Partoprenu en internacia rondo de 100 ĝis 150 personoj el ĉirkaŭ 20 landoj; ĝuu la faman IF-etoson! Komforta domo urbocentre kun belaj salonoj kaj etosoplana trinkejo ofertas al vi agrablan restadon.

• Kontaktu Hans-Dieter Platz: [HDP@internacia-festivalo.de](mailto:HDP@internacia-festivalo.de) ([www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de)).

# Venu al Drondo en la fama hotelo Adelphi de Liverpolo




La deka 'Drondo' (t.e. diskutrondo) okazos en nova loko, ĉe la monde konata Adelphi, la plej granda hotelo en Liverpolo, de la 23a de novembro al la 25a.

Kiel kutime drondanoj diskutos pri pluraj temoj nur en Esperanto, do progresintoj bonvenas por ĵeti sin en la lingvon kun la fluaj parolantoj. Inter la temoj por debatado ĉi-foje troviĝos • "La estonteco de ĵurnaloj", • "Ĉu iam respubliko por Britio?" en tiu jaro, kiam festas sian 60an jubileon la reĝino kaj • "Ĉu sukcesa somero nacie?", kiu postulos reagojn al la elspezo por la tiam pasintaj Olimpiaj Ludoj en Londono kaj senduba fiasko de la angla futbalteamo en Ukrainio kaj Pollando post neevitebla nacia fervoro antaŭa, kaj finiĝante per diskutado pri la "jubilea festado".

Bonaj aspektoj abundas. La hotelo estas nur je kvin-minuta piediro for de la stacidomo Liverpool Lime Street kaj subvencio afable donata de Fondaĵo Raymond Williams kondukas al tio, ke la semajnfino kostas nur £80 (anstataŭ £140) por tranoktado kaj ĉiuj manĝoj krom lunĉoj (aĉeteblaj en kafejo) – do la kosto vere ne altas.



Samtempe okazos prelegoj por Fondaĵo Raymond Williams, kaj drondanoj estos liberaj partopreni ne nur drondo-sesiojn sed ankaŭ tiujn (anglalingvajn) de la Fondaĵo, kies temoj inkluzivas "The Occupy Movements", "Cooperatives and Mutuals" kaj "Peace Movement Priorities". Do vere temas pri du aranĝoj por prezo de duono!



## John Francis

La kolekto *Danco de vivo* de John Francis enhavas multajn neniam antaŭe publikigitajn poemojn.

### Enhavo

Tipolo. Krizo. Al malfruantaj solenontoj. Se perfekte estus belo. Lageto. Aborto. Motivoj. Hebridea romano. Funebra festo. Indigno kontraŭ rezignacio. Spleno. La glavo kaj la fibulo. Ombroj en mateno. Eliro en dilemon. Vivosablo. Fera fanfaro. Rikolto sin resemos do. Himno al laboro. Ĝis revido. Influoj (1). Influoj (2). Danco de vivo. Balado.

### Apendico

Ĝeraldina. Plankatene. La kosmo (reviziita). Ne, sed kaprice. Terapa retoro. A P R I L A. O M O R E S. Estado. Timo. Bremsu la jarojn. En amo denove esperartista. Frajlino. Renkonto.

| *Danco de vivo kaj aliaj poemoj*

| Motherwell: Scottish Esperanto Association, 2012.

| 79 paĝoj, 21cm, broŝurita. ISBN 978-0-9540252-3-6.

| Prezo ĉe la Libroservo de EAB: £6 + 20% por sendokostoj.